La humanisma kadro de Julian Huxley, Evolua etikisto

En la 1940-aj jaroj estiĝis du ĉefaj penstendencoj pritraktantaj la evoluon, ne nur en la animala regno sed tra la tuta kosmo, por provi rilatigi tiun vastan koncepton al la religia kaj spirita vivo de la homo. Unu el tiuj filozofioj estis la skolo (aŭ kulto) de la franca jezuito Pierre Teilhard de Chardin*, kiu predikis sian mistikan kristanismon (nur postmorte, ĉar la katolika eklezio subpremis liajn verkojn dum lia vivo). Supraĵe derivita de principoj de la evoluo, la filozofio de Teilhard de Chardin enhavas kiel primaran elementon la mistikismon; la evoluaj principoj estas torditaj aŭ falsitaj, por ke ili havu ŝajnan koheron kun la nesciencaj nemateriismaj premisoj de tiu penssistemo.

La dua tendenco, kiun oni povas nomi la skolo de la evoluaj etikistoj, estis iniciato plejparte de biologoj, kiuj demonstras per logike kohera argumentado, ke estas reala kunligo inter evoluprocezoj kaj la etikaj sentoj de la homo. Estis ĉefe Julian Huxley, racionalisto kaj filozofo pri la scienco, kiu ellaboris la kernajn principojn de tiu integrigita idesistemo. Kiel membro de unu el la intelekte plej eminentaj familioj en la mondo, Julian Huxley apenaŭ bezonas prezentadon. Lia avo, Thomas Henry Huxley, la fama biologo, estis la unua fakulo, kiu defendis la evoluismon de Karlo Darwin. Du generacioj da posteuloj de Thomas Huxley akiris renomon en diversaj sciencobranĉoj, artoj kaj publikaj sferoj de la vivo, sed Julian Huxley, pli rimarkinde ol la aliaj familianoj, sekvis la paŝojn de sia avo kiel sciencisto kaj edukisto. Li profesoris kiel biologo en la zoologia fako de la Universitato de Londono, esplorante precipe hormonojn, la evoluproceczon, ornitologion kaj ekologion. Li estas konata ankaŭ kiel la unua ĝenerala direktoro de UNESKO. Krom fakaj verkoj, Julian Huxley skribis pri filozofiaj demandoj temantaj ĉefe pri la destino de la homo ankoraŭ evoluanta en la direkto al pli altaj niveloj.

Antaŭ ol detale prezenti la idesistemon de la etikaj evoluistoj, estas necese ekzameni la nocion de evolustadioj de la Tero laŭ la vidpunkto de la teoria biologio. En la spaca kaj tempa dimensioj de la historio de la Tero troviĝas diversaj sferoj karakterizantaj kondiĉojn sur la planedo. Antaŭ la estiĝo de la vivo la Tero estis morna kaj malfekunda astro. Tiu neorganika stato nomiĝas la geosfero kaj inkludas la litosferon (rokon kaj grundon), la hidrosferon (akvon) kaj atmosferon (aeron). Post milionoj de jaroj, rezulte de kemiaj kaj fizikaj procezoj, la vivo formiĝis en la ekstera parto de la geosfero, kiu ricevis la nomon biosfero, la zono de la vivo. Ĝi estas energideturnanta tavolo uzanta la materion de la Tero por fari vivantan substancon. Okaze de la alveno de la homo, la biosfero fariĝis pli kaj pli influita de liaj agadoj kaj fine estis preskaŭ tute transformita en la antroposferon. La minacanta mastrado kaj ekspluatado de la Tero fare de la homo kondukis al la estiĝo de ankoraŭ unu zono por celkonscia mastrumado de la resursoj** de la geosfero, biosfero kaj antroposfero. Tiu zono estas la ekosfero ampleksanta la tutaĵon de ĉiuj organismoj de la Tero interagantaj kun la fizika ĉirkaŭmedio. Surmetita sur la antaŭe priskribitajn sferojn estas la noosfero, termino derivita de la helena vorto *noos*, "menso". Laŭ la teoria biologio la noosfero estas tiu parto de la mondo influita de la koncepta pensado de la homo. Kelkaj fakuloj rigardas ĝin kiel sammpleksan kun la antroposfero. Ĝi estas la nivelo de la menso aŭ intelekto, kontraste kun la nevivanta mondo de la geosfero kaj la vivanta mondo de la biosfero. Alivorte difinebla, la noosfero estas la biosfero modifita konscie aŭ nekonscie de homaj agadoj.

La koncepto de la noosfero estis uzata

ankaŭ de kelkaj sciencaj teoriuloj en iliaj filozofiaj sistemoj: Vladimir Ivanoviĉ Vernadsky, la fondinto de la geokemio kaj biogeokomio; Edouard Le Roy, franca filozofo pri la scienco, etiko kaj religio; kaj ankaŭ Teilhard de Chardin kaj Julian Huxley. Laŭ ilia vidpunkto, la daŭra genetika evoluo de la homa menso iris paralele kun la disvolviĝo de la materio, ambaŭ karakterizitaj per ĉiam pli granda kompleksèco. Tiu procezo ne estis unuforma kaj iompostioma, sed post periodo de laŭgrada progreso ĝi atingis punkton, kie okazis perturbo de ekvilibro; tio ebligis la eliron de novaj kvalitoj kaj agadoj. Unu el tiaj novaĵoj estas la transiro de neviva al viva materio; dua estis la transformiĝo de la homeda praulo en veran homon. En tiu ĉi kazo la plej grava nova kvalito estis la akiro de konceptkapablo kaj memkonscio, efektivigitaj de la disvolviĝo de socia vivo kaj la akiro de parolkapablo. La trarompo de la homo en la novan evolutavolon, la noosferon, estis la rezulto de lia kapablo pensi per lingvaj simboloj kaj tiel elvoki reagojn aŭ sentojn ĉe aliaj samspecianoj, kaj ankaŭ transdoni ideojn laŭ la plej ekonomia maniero.

Uzante la koncepton de la noosfero, Teilhard de Chardin provis konstrui ponton inter la biologio kaj la religio. Unue okazis la kosmogenezo, la disvolviĝo de la mondo, en kiu unu ordo de bestoj, la primatoj, evoluis en la direkto al homiĝo. Rezulte de la ekkresko de sia menso, procezo nomata noogenezo, la homo sukcesis okupi la centron de tiu kosmo. Lia evoluo ne haltis, kaj atinginte la stadion de ultrahomiĝo, la homo trarompis en la noosferon. Laŭ Teilhard de Chardin la homo nun evoluas mense kaj socie en la direkto al spirita unuiĝo akompanata de kunfandiĝo de la scienco kaj la religio.

Julian Huxley konceptas la noosferon kiel nepalpeblan maron de pensado, en kiu la homo ekzistas same kiel fiŝoj en la hidrosfero. Flosantaj en la noosfero estas la amasiĝintaj produktoj de la scienco, arto kaj pensado de ĉiuj epokoj. La homo penetris en tiun kulturan ĉirkaŭmedion relative antaŭ nelonge laŭ la mezurado de geologia tempo, elirinte de la terligita biosfero en la liberon de la noosfero. Jam ne estas bezonataj instinktoj, ĉar la homo povas uzi siajn konsciajn pensojn kaj intencojn por trovi vojon tra la labirinto de ekzistado. Tamen, ĝis nun li havis nur limigitan sukcèson. Li ankoraŭ ne estas tute ĉehejme en la nova ĉirkaŭmedio, sed li povas vidi, kio kuŝas antaŭ li, per sia racia imago bazita sur scio. Tiu kapablo devas esti plibonigita. En la noosfero la homo povas alvoki la potencialon de sia propra naturo, kiu ebligos al li la akiron de la riĉaĵoj de tiu nova stadio de evoluo.

Neniu povas pli bone priskribi tiun evoluan transformiĝon de la homo kaj lia ĉirkaŭmedio ol Julian Huxley mem. La sekva eltiraĵo estas traduko de parto de anglalingva eseo, en kiu Huxley koncize resumas sian idesistemon. Li titolas ĝin "La Humanisma Kadro"**.

"...ĉiuj aspektoj de la realo estas regataj de la evoluo, de atomoj kaj steloj ĝis fiŝoj kaj floroj, de fiŝoj kaj floroj ĝis homaj socioj kaj valoroj — ja ... la tuta realo estas unuobla procezo de evoluo. Kaj nia periodo estas la unua, en kiu ni akiris sufiĉan scion por komenci vidi la konturon de tiu ĉi vasta procezo kiel tutaĵon.

Nia vido de la evoluo nun inkludas la malkovron, ke biologia progreso ekzistas kaj ĝi okazas en serio de ŝtupoj aŭ gradoj, ĉiu grado okupita de sukcesa grupo da bestoj aŭ plantoj, ĉiu grupo deveninta de antaŭekzistanta grupo kaj karakterizita per nova kaj plibonigînta konfiguracio* de organizo.

Plibonigînta organizo donas biologian avantaĝon. Tial la nova tipo fariĝas sukcesa

aŭ dominanta* grupo. Ĝi disvastiĝas kaj multiĝas kaj diferenciĝas en multoblecon da branĉoj. Tiu ĉi nova biologia sukceso kutime estas akirita je la biologia malprofito de la pli malnova dominanta grupo, el kiu ĝi devenis, aŭ kies lokon ĝi uzurpis. Tiel la kresko de la placentaj mamuloj estis korelaciita kun la malkresko de la surteraj reptilioj, kaj la birdoj anstataŭis la pterosaŭrojn kiel dominantoj en la aero.

De tempo al tempo, tamen, kiam la trabato al nova tipo de organizo estas ankaŭ trabato en tute novan ĉirkaŭmedion, la nova tipo eble ne konkuras kontraŭ la malnova, kaj al ambaŭ estas eble daŭre kunekzisti en plena florado. Tiel la evoluo de surteraj vertebruloj neniumaniere malhelpis la daŭran sukceson de la dominanta grupo de la maro, la teleostaj ostecaj fiŝoj.

La sinsekvaj konfiguracioj de sukcesa organizo estas stabilaj konfiguracioj; ili ekzempligas kontinuecon kaj emas persisti tra longaj periodoj. La repitilioj restis reptilioj dum kvaronbiliono da jaroj; la testudoj, serpentoj, lacertoj kaj krokodiloj estas, ĉiuj, ankoraŭ rekoneble reptiliaj, ĉiuj variaĵoj de unu organiza temo.

Estas malfacile por la vivo superi tiun ĉi stabilecon kaj atingi novan sukcesan organizon. Por tio, trabatoj al novaj dominantaj tipoj estas tiel maloftaj — kaj ankaŭ tiel gravaj. La reptilia tipo elradiis en pli ol dekduon da gravaj grupoj aŭ ordoj; sed ĉiuj el ili restis interne de la reptilia kadro krom du, kiuj trarompis al la novaj kaj mirinde sukcesaj konfiguracioj de la birdo kaj la mamulo.

En la fruaj stadioj nova grupo, kiel ajn sukcesa ĝi fine fariĝos, estas malmultenombra kaj malforta kaj montras neniujn indikojn de la sukceso, kiun ĝi eble fine atingos. Ĉia trabato ne estas tuja afero, sed devas esti efektivigata per serio da pliboniĝoj, kiuj fine kunforĝiĝas al la nova stabiliĝinta organizo.

Ĉe la mamuloj unue estis la hararo, poste la lakto, poste parta kaj pli malfrue plena reguligo de temperaturo, poste mallonga kaj fine plilongigita interna disvolviĝo kun la evoluo de la placento. Mamuloj de malgranda kaj malgrava speco ekzistis kaj evoluadis dum proksimume cent milionoj da jaroj, antaŭ ol ili atingis la plenan trabaton al sia eksploda dominado en la kenozoiko.

Io tre simila okazis dum nia propra trabato de mamula al psikosocia organizo. Niaj antaŭhomaj simiaj prauloj neniam estis aparte sukcesaj aŭ abundaj. Por ilia transformiĝo en la homon serio da paŝoj estis necesa. La malsupreniro de la arboj; la vertikala pozo; ioma pligrandiĝo de la cerbo; kutimoj pli karnomanĝaj; la uzado kaj poste la farado de iloj; plua pligrandiĝo de la cerbo; la malkovro de la fajro; la vera parolo kaj lingvo; la ellaborado de iloj kaj ritoj. Tiuj ĉi paŝoj daŭris dum la pli granda parto de duonmiliono da jaroj; la homo ne povis komenci meriti la titolon de dominanta tipo ĝis antaŭ malpli ol centmil jaroj kaj li ne fariĝis plene dominanta ĝis antaŭ malpli ol 10.000 jaroj.

Post la eliĝo de la homo kiel vera homo, la samo daŭre okazis, sed kun grava diferenco. La evoluo de la homo ne estas biologia sed psikosocia: ĝi funkcias per la mekanismo de kultura tradicio, kiu kuntrenas la amasiĝan sinreprodukton kaj sinvariigon de mensaj agadoj kaj iliaj produktaĵoj. Tial, ĉefaj paŝoj en la homa fazo de la evoluo estas atingitaj per trarompoj al novaj dominantaj konfiguracioj de mensa organizo, de scio, ideoj kaj kredoj — ideologia anstataŭ fiziologia aŭ biologia organizo.

Estas, tiel, sinsekvo de sukcesaj idesistemoj anstataŭ sinsekvo de sukcesaj korporganizoj. Ĉiu nova sukcesa idesistemo disvastiĝas kaj dominas iun gravan sektoron de la mondo, ĝis ĝi estas anstataŭita de rivala sistemo, aŭ ĝi mem naskas sian posteulon per trarompo al nova organizita sistemo de penso kaj kredo. Ni bezonas nur pensi pri la magia konfiguracio de triba pensado, la di-centrita mezepoka konfiguracio organizita ĉirkaŭ la koncepto de dia aŭtoritato kaj revelacio, kaj la kresko en la lastaj tri jarcentoj de la sciencocentrita konfiguracio organizita ĉirkaŭ la konceptoj de homa progreso, sed progreso iumaniere sub la regado de supernatura aŭtoritato. En 1859 Darvin malfermis la pordon al nova konfiguracio de ideologia organizo — la evolucentrita organizo de penso kaj kredo.

Tra la teleskopo de nia scienca imago ni povas distingi la ekziston de tiu ĉi nova kaj

pliboniĝinta ideologia organizo, kvankam en embria formo; sed multaj el ĝiaj detaloj ankoraŭ ne estas klaraj, kaj ni povas vidi ankaŭ, ke la suprenirantaj paŝoj bezonataj por atingi ĝian plenan disvolviĝon estas multaj kaj malfacile fareblaj.

Mi ŝanĝu la metaforon. Al ĉiuj, krom tiuj, kiuj intence fermis aŭ forturnis siajn okulojn, aŭ kiuj ne havis permeson rigardi fare de siaj pastroj aŭ mastroj, estis tuj klare, ke la fakto kaj koncepto de evoluo nepre devis agi kiel la centra ĝermo aŭ vivanta ŝablono de nova kaj dominanta pensorganizo. Kaj en la jarcento de post *La Origino de Specioj* estis multaj provoj kompreni la implicojn de evoluo en multaj kampoj, de la aferoj de la stela universo ĝis la aferoj de homoj, kaj estis pluraj enkondukaj kaj precipe antaŭtempaj klopodoj integrigi la faktojn de evoluo kaj niajn sciojn pri ĝiaj proceĵoj en la inkluzivan organizon de nia ĝenerala pensado.

Ĉiuj dominantaj pensorganizoj okupas sin pri la lastaj samkiel la nunaj problemoj de la ekzisto: aŭ mi prefere dirus, pri la plej lastaj problemoj, kiujn la pensado de la epoko kapablas antaŭvidi aŭ eĉ formuli. Ili ĉiuj okupas sin por doni iun interpreton pri la homo, pri la mondo, en kiu li devas loĝi, kaj pri lia loko kaj rolo en tiu mondo — alivorte iun kompreneblan bildon de la homa destino kaj signifo.

La larĝaj konturoj de la nova evolubildo de lastaj aferoj komencas esti klare videblaj. La destino de la homo devas esti la sola efektiviganto por la estonta evoluado de tiu ĉi planedo. Li estas la plej alta dominanta tipo produktita de pli ol du- kaj duonbilionjara malrapida biologia pliboniĝo efektivigita de blinda oportunisma funkciado de natura selektado; se li ne detruas sin, li havas almenaŭ egale longan periodon de evolutempo antaŭ si por praktiki sian efektivigon.

Dum la pli malfrua parto de biologia evoluado, la menso — nia vorto por la mensaj agadoj kaj proprecoj de organismoj — eliĝis kun pli granda klareco kaj intenso kaj komencis ludi pli gravan rolon en la individuaj vivoj de bestoj. Fine ĝi trarompis por fariĝi la fundamento kaj ĉefa fonto de plua evoluado, kvankam la esenca karaktero de la evoluo nun fariĝis kultura anstataŭ genetika aŭ biologia. Al tiu ĉi trarompo, efektivigita de la aŭtomata mekanismo de natura selektado kaj ne per iu konscia strebado siaflanke, la homo ŝuldas sian dominantan evolupozicion.

La homo, do, estas ege signifplena. Li estis eligita el sia memimagita centreco en la universo al infinitezima loko en periferia pozicio en unu el miliono da galaksioj. Kaj ne ŝajnas, ke li konjekteble estas unika kiel sentipova estulo. Aliflanke la evoluo de la menso aŭ sentipovo estas treege malofta evento en la vasta sensignifeco de la nesentipova universo, kaj la aparta speco de sentipovo de la homo ja povas esti unika. Sed ĉiukaze li estas ege signifplena. Li estas rememorigilo pri la ekzisto, tie kaj ĉie, en la kvanta vasteco de kosma materio kaj ĝiaj energiekvivalentoj, de tendenco al la menso kun ĝia akompanaĵo de kvalito kaj riĉeco de ekzisto; kaj plue, pruvo de la graveco de la menso kaj kvalito en la ĉioampleksanta evoluproceĵo.

Nur ĉar li posedas menson, li fariĝis la dominanta parto de tiu ĉi planedo kaj la efektiviganto respondeca pri ĝia estonta evoluo: kaj nur per la ĝusta uzo de tiu menso, li povos praktiki la respondecon ĝuste. Li ja tro facile povus esti malsukcesanto en la tasko; li sukcesos nur, se li alfrontas ĝin konscie kaj se li uzas ĉiujn siajn mensajn rimedojn — scion kaj rezonon, imagon kaj sentivecon, kapablojn por miro kaj amo, por kompreno kaj kompato, por spirita aspiro kaj morala peno.

Kaj li devas alfronti ĝin sen ekstera helpo. En la evolukonfiguracio de pensado jam estas nek bezono nek loko por la supernaturo. La Tero ne estis kreita: ĝi evoluis. Same evoluis ĉiuj bestoj kaj plantoj, kiuj loĝas sur ĝi, inkluzive de niaj homaj memoj, la menso kaj animo samkiel la cerbo kaj korpo. Ankaŭ la religio evoluis. Religioj estas organoj de la psikosocia homo, okupiĝantaj pri la homa destino kaj pri la travivaĵoj de sakraleco* kaj transcendeco. En sia evoluado kelkaj (sed neniumaniere ĉiuj) naskis la koncepton de dioj kiel supernaturaj estuloj dotitaj per mensaj kaj spiritaj proprecoj kaj kapabloj interveni en la aferojn de la naturo, inkluzive de la homo. Tiuj ĉi teismaj religioj estas organizoj

de la homa pensado en ĝia interago kun la enigma, kompleksa mondo, kiun ĝi devas kontraŭstari — la ekstera mondo de la naturo kaj la interna mondo de la propra naturo de la homo. Tiel ili similas al aliaj pli fruaj organizoj de la homa pensado alfrontita de la naturo, kiel la doktrino de la Kvar Elementoj, la fero, aero, fajro kaj akvo, aŭ la Orienta koncepto de renaskiĝo kaj reenkarniĝo. Kiel tiuj ĉi, ili estas destinitaj malaperi en konkuro kontraŭ aliaj pli veraj kaj pli ampleksantaj pensorganizoj, kiuj okupiĝas pri la sama gamo de kruda aŭ modifita sperto.

La evoluhomo jam ne povas rifuĝi de sia soleco, rampante protektcele en la brakojn de diigita patrofiguro, kiun li mem kreis, nek eskapi de la respondeco fari decidojn, ŝirmante sin sub la ombrelo de la Dia Aŭtoritato, nek absolvi sin pri la malfacila tasko alfronti siajn aktualajn problemojn kaj plani sian estontecon, fidante la volon de ĉioscianta sed bedaŭrinde nepenetrebla Providenco. Aliflanke, lia soleco estas nur ŝajna. Li ne estas sola kiel tipo. Dank'al la astronomoj li nun scias, ke li estas unu inter la multaj organismoj, kiuj atestas la tendencon al sentipovo, menso kaj riĉeco de estado, funkciantan tiel vaste sed tiel malabunde en la kosmo.

Pli aktuale gravas, dank'al Darvin, ke li nun scias, ke li ne estas izolita fenomeno apartigita de la resto de la naturo pro sia unikeco. Li estas ne nur farita el la sama materio kaj funkciigata de la sama energio kiel la tuta cetero de la kosmo, sed malgraŭ sia tuta distingiteco, li estas ligita per genetika kontinueco kun ĉiuj aliaj vivantaj loĝantoj de sia planedo. Bestoj, plantoj kaj mikroorganismoj, ĉiuj estas liaj vivantaj kuzoj aŭ pli malproksimaj parencoj, ĉiuj estas partoj de unuobla disbranĉiĝanta kaj evoluanta fluo de metabolanta protoplasmo."

Huxley, do, rigardas kiel krizajn du punktojn en la pasinteco de la evoluado, ĉar ĉe ambaŭ la procezo superis sin, paŝante de malnova stato al nova kun alispecaj proprecoj. La unua punkto estas indikita de la paŝo de la neorganika fazo al la biologia fazo; la dua estas la transiro de la biologia al la psikosocia.

Nun granda antaŭeniro en la psikosocia stadio de la evoluprocezo postulas radikalan ŝanĝon en dominantaj idesistemoj. Idesistemo aŭ noosistemo estas la regno de la menso kaj ĝiaj produktoj, kiun la homo kreis kaj kiun li surloĝas. Ĝi inkludas kredojn, sintenojn kaj ankaŭ intelektajn konceptojn kaj ideojn. Ĝenerale, idesistemo koncernas konscie aŭ nekonscie kredojn pri la homa destino, kaj ĝi ĉiam influas la ĝeneralan sintenon de la homo pri la vivo kaj lian aliron al praktikaj aferoj. Homoj edukitaj en certa idesistemo malfacile povas kompreni vivmanierojn de aliaj malsimilaj idesistemoj. Por la civilizita homo hodiaŭ tute fremda estas la idesistemo de primitivuloj vivantaj en la ombro de la magio, aŭ de la mezepoka socio, kiu estis teologie centrita kun la Tero kiel ĉefpunkto, regata fare de ĉioscia kaj ĉiopotenca bonvola supernatura Estulo.

Meze de la 20-a jarcento la malnovaj tradiciaj kredoj elmodiĝis en kriza periodo karakterizita de senitluziiĝo pro la malkapablo de la homo solvi bazajn problemojn de kunvivado. Samtempe kreskis la konstato, ke pure materiisma vidpunkto ne povas doni adekvatan bazon por la homa vivo. Jam amasiĝis multe da scio pri la fizika mondo kaj pri la homo kaj sociaj grupoj; tamen tiu scio ne estis aplikata al la homa vivo por solvi ĝiajn problemojn, ĉar mankis difinitaj gvidlinioj. Laŭ Huxley ni nun estas sur la sojlo de tria stadio, la paŝo de la psikosocia al la konscie celema stadio de evoluo, alivorte, la stadio de la evoluproccezo, en kiu la homo de la 20-a jarcento fariĝas konscia pri si mem kaj komencas studi sin kaj plani la direkton de sia estonteca disvolviĝo.

Huxley donas la nomon humanismo[3] al la unuiĝinta kadro de ideoj por nova sistemo de penso kaj kredo koncernanta la destinon de la homo. Lia idesistemo estas humanisma, ĉar ĝi povas esti bazita nur sur la homo kiel organismo, kvankam organismo kun unikaj proprecoj. Fundamenta estas la nocio, ke la homo estas natura fenomeno produktita de la evoluprocezo kaj li estas respondeca pri ties estonteca direkto. Li ne povas eviti la ludon de decida rolo en la gvidado de la disvolviĝo de la homa specio.

La humanismo estas necese unueca, ne dualisma. La dualismo estas kredo, ke ekzistas

supernaturaĵ estuloj de persona aŭ superpersona naturo, kapablaj influi naturajn eventojn, inkluzive de eventoj en homaj mensoj. Dualisma teorio, do, implicas la ekziston de baza kaj esenca fendiĝo inter la natura kaj supernatura regnoj de la ekzisto.

La evolua humanismo asertas la kontinuecon de la menso kaj la korpo; ĝi estas universala anstataŭ apartiga, asertante la kontinuecon de la homo kun la cetero de la vivo kaj de la vivo kun la cetero de la universo. Ĝi estas naturalisma anstataŭ supernatureca, asertante la unuecon de la spirito kaj la materio. Kaj ĝi estas tutmonda anstataŭ disdivida, asertante la unuecon de la tuta homaro. La humanisto pensas pri direkta procezo anstataŭ pri senmova mekanismo, pri kvalito kaj diverseco same kiel pri kvanto kaj unueco. Li ne akceptas absolutajn ideojn kiel la absolutan veron, absolutan moralecon, absolutan perfektecon kaj absolutan aŭtoritatecon sed serĉas normojn, al kiuj agadoj kaj celoj povas esti ĝuste rilatigitaj.

Laŭ Huxley la radiko de la etiko estas en la naturo, do ĝi ne havas supernaturan originon. Eksteraj moralaj principoj aŭ normoj ekzistas en biologiaj faktoj, precipe en la procezo de evoluo, kaj tiu moraleco povas funkcii kiel gvidilo aŭ mezurilo de la etika aspekto de homa agado. Progresive pli altaj niveloj de kosmomaterio estigas novajn eblojn de estado, agado kaj travivado. La kulmino de tiu direkto de evoluo estas la atingo de stato, en kiu la kosmomaterio en homa formo trovas, ke kelkaj el la novaj ebloj havas valoron en aŭ por si mem, kaj la homo asignas al tiuj valoroj gradojn pli altajn kaj pli malaltajn. La pli altaj valoroj estas tiuj, kiuj estas pli fundamente aŭ pli daŭre kontentigaj, aŭ kiuj kuntrenas pli grandan gradon de perfekteco. La faktoj de la naturo kiel demonstritaj en la evoluo certigas nin, ke la scio, amo, belo, altruisma moraleco kaj konscia celado estas etike bonaj. Huxley opinias, ke la ideo de progreso, ĉar ĝi estas evoluada en certa difinebla direkto, povas fariĝi la bazo de religio, en kiu mankas Dio kaj revelacio. Li rigardas la religion kiel aplikatan spiritan ekologion, kiu klarigas la rilatojn de la homo kun la ekstera naturo, la homaro, lia interna naturo kaj la socio. La funkcio de tia religio kiel psikosocia organo de la evoluanta homo estas devigi al li okupiĝi pri la problemoj de sia destino.

La nova penskonfiguracio estas evolucentra. Ĝi estas provo etendi la koncepton de evoluo tra la plej larĝa gamo de fenomenoj. Ĉiuj tiuj fenomenoj — kosmologiaj kaj biologiaj, materiaj kaj homaj, longdaŭraj kaj efemeraj — lokiĝas en la ĉioampleksanta procezo de evoluo. La kulmino de la evoluo de la homo estis la disvolviĝo de la menso kiel la dominanta faktoro kondukanta al la evolua sukceso de la homo. Se la homo nun estas en la plej antaŭa fazo de la anageneza aŭ progresiva evoluo, t.e. la evoluo de malsupraj al pli supraj niveloj, en kiu partoprenas la tuta animala regno, sekvas de tio, ke estas la devo de la homo, ne nur al la homaro sed ankaŭ al la tuta vivanta mondo, uzi siajn specialajn kapablojn de racio kaj socia organizado por certigi, ke lia propra estonteca evoluo daŭrigos la saman tendencon plibonigi la ekziston.

La homo devas kalkuli nur je si por realigi ĉiam novajn eblojn en la evoluo, precipe tiujn valorigitajn por si mem. Tion li faros esplorante la resursojn haveblajn al li kaj en la ekstera mondo kaj interne de li, por povi difini siajn celojn kaj plani sian vojdirekton. Kaj scio kaj imago estas bezonataj por fari tion. Pro tio la humanismo devas baziĝi sur la scienco, uzante la sciencan metodon por akiri scion kaj akceptante la neeviteblecon, eĉ dezirindecon de ŝanĝo, malgraŭ ke povas okazi konfliktoj kun la malnovaj idesistemoj.

La humanismo respektas la homan individuecon kaj stimulas ties plenan disvolviĝon. La individuo devas senti, ke li ne estas radeto en socia maŝino aŭ senhelpa viktimo de vastaj nepersonaj fortoj. Li ja povas fari ion por evoluigi sian propran personecon kaj tiel kontribui al la plenumo de la homa destino. Huxley specifas tion jene.

"La gravaj celoj de la homa vivo inkludas la kreon kaj ĝuon de la belo, kaj natura kaj homfarita; pliigitan komprenon kaj pli certigitan senton de signifado; la konservadon de ĉiuj fontoj de pura miro kaj ĝojo, kiel belega pejzaĝo, sovaĝbestoj en libereco, aŭ la nepoluita* naturo; la atingon de interna paco kaj harmonio; la senton de aktiva partoprenado

en ampleksantaj kaj daûraj projektoj, inkluzive de la kosma projekto de evoluo. Per tiaj aferoj individuoj atingas pli grandan plenumadon."

La humanismo celas konstrui ankaû mekanismon por plua socia evoluo, plibonigante socian organizadon kaj trovante dezirindajn direktojn por socia disvolviĝo. Jen la precipa ĉioinkluziva celo de la humanismo: akceli pli grandan plenumadon por homaj individuoj kaj pli plenan atingadon por homaj socioj.

Bernard Golden

Glosoj (vortoj ne klarigitaj en la teksto)

domini (tr) — superregi, superstari, superpotenci, superforti.

konfiguracio — (1) relativa aranĝo de partoj; io produktita per tiu aranĝo (figuro, konturo, desegno, aparato); (2) specifa formo, kiun prenas homa socio, rezulte de sia kulture normigitaj agadoj.

polui (tr) — malpurigi vivesencan elementon, kiu fariĝas malsaniga por la uzantoj (kp. la teknikan difinon de "polucio" en *Plena Ilustrita Vortaro*).

resurso — natura fonto de riĉeco organika aû neorganika; naturriĉaĵo; spirita aû intelekta riĉeco.

sakrala — dediĉita aû apartigita por servo aû adoro al dio; digna je religia respektego; rilata al religio; nek sekulara nek profana.

Notoj

1. Vidu la tradukitan elĉerpaĵon de lia libro *La Homa Fenomeno* en *Sennacieca Revuo*, 1981, n-ro 109, p. 43-50.
2. "The Humanist Frame" de Julian Huxley (p. 11-48) en la kolekto da eseoj titolita *The Humanist Frame*, redaktita de Julian Huxley, Londono, 1961.
3. La moderna signifo de la termino "humanismo" uzata de pensuloj okupiĝantaj pri la rilato de la homo al la kosmo, diferencas de la tradicia difino de la vorto en *Plena Ilustrita Vortaro:* "doktrino, serĉanta en la helenlatina civilizo la plej bonan rimedon por humanigi kaj klerigi la homaron." Laû la sama vortaro "humanisto" estas: "fakulo studanta la helenlatinan civilizon kaj la antikvajn klasikajn literaturojn." En la hodiaûa filozofio la "humanismo" estas: doktrino, sinteno aû vivmaniero, kies valorsistemo, centriĝante en homaj interesoj, emfazas la personan valoron kaj dignon de ĉiu individuo kaj lian kapablon por memplenumado per la racio; sekve de tiu antropocentra vidpunkto la humanismo ofte rifuzas la supernaturecon.

Pafe-trafe al la celo

Duonfablo el subtablo

Ĉiun matenon
mi gajnas migrenon,
vidante azenon,
kiu en plena memgloro,
kun arbitreco, sen fervoro-
dotite per gvidmonopolo-
laûtsonorilo je la kolo-
avangardas sur montaron
la senopinian adeptaron-
ensorĉitan blankŝafaron.

Ĉu azeno frontas avangarde,
aû ŝafar' ĝin sekvas hazarde?
Et-forestas la dubo-inundoj-
azenordon prizorgas ŝafhundoj...

Ĉu tio estas la motivo
por idilia skerco,
aû por pentroarta naivo,
ĉu kamaradeca ŝervo,
aû nur preterekzerco
pri akuzativo?

La prospero de la vero

Mi estas aplaûdanto
al la vero de Sekanto
ke el Karlo suno ridas,
ke proletoj memdecidas.

Akompanas mandolino
romancon pri belulino
kies nomo estis Vero,
ambicio: - Kariero.

En somero, dum vespero,
la koketulino Vero-
investinte unu vangon-
akiris plej altan rangon.

Nun triumfas la destino
de la ĉarma virgulino:
Sûr promenej' apud maro-
Vero estas fama Varo...

Kompoto el sacerdoto

Li estas nur per televid' konata,
laûkutime, nobele pagata
por ies laboron priparoli,
nu, sed ne por mem laborbonvoli.

En lia ŝtatisma tabu-pedigro [x]
dure arbitras intelekta pigro
kaj la manio retorikon stiri-
tro paroli por nenion diri.

Al proletaro estas malklara
lia socia rolo bizara,
ĉu li estas la klasika mastro,
ĉu la moderna proleta pastro?
El "dilemo" tamburas tamtamo
ke ĉio sume estas sam-samo...

Sed lin favoras mistero subtena,
la preĝ' egzaltita, ĉiumatena,
pie suflorata el menso ebena:
"-Ave Partia, gracia plena....."

M. P. (32201)

(x) pedigro = genealogia atesto.